SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr


1-a U.K.
1905-2005
Bulonjo ĉe Maro

PIV 2005
ĵus aperis

Foto: Krešimir Barković

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Aprilo 2005 76-a jaro, n-ro 4 (1198)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163-0442 Prezo: 5 €



El la redaktejo...



Karaj,
jen la nova evento en la vivo de nia Asocio. Temas pri la ĵusa apero de PIV 2005, kiun ni sukcesis eldoni danke al via helpo. Per tio SAT daŭre plenumas sian kulturan rolon. En la sama numero vi trovos tre diversajn artikolojn kaj opiniojn de niaj gekamaradoj. Ni alproksimiĝas al somero kaj nia kongreso kiu okazos ĉijare multe pli frue ol kutime. Do necesas tuj aliĝi ĉar ĝi certe estos unu el la plej gravaj kongresoj pro decidoj kiuj devos esti alprenitaj. Se SAT estas grava por vi, nepre venu ĉar via ĉeesto kaj aktiva partopreno povos esti decidiga. Do, ne hezitu, ĉar krom seriozaj laboroj vi ĝuos belan kulturan kaj distran programojn en bela kaj gastema urbo.

Via Redaktoro.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSRFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.




Imprimé par : EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

PIV 2005
ĵus aperis



Dum sia vizito al la SAT-sidejo, nia amiko Petro Chrdle pridiskutis kun du PK-anoj pri la ekstera koloro de la nova PIV. Tre atente la triopo ekzamenis diversajn koloreblecojn kaj fine oni elektis la bluan (vidu la foton maldekstre).



Nun la PIV 2005, korektita kaj renovigita estas aĉetebla ĉe diversaj libroservoj kaj evidente ĉe SAT. La vendoprezo estas 80 € + afrankokosto.

Daŭre eblas aĉeti la eldonon de la jaro 1987 je tre favora prezo: 30 €. Tiuj kiuj tute ne posedas Plenan Ilustritan Vortaron nepre aĉetu ĝin. Vi povas fari donacon al viaj geamikoj el nepagipovaj landoj, aŭ kiuj ne povas, faru al si mem tian donacon. Ĝi daŭre estas aktuala kaj uzebla. Ĉiu serioza esperantisto posedu tiun nemalhaveblan vortaron.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Kiel funkcias la tutmonda merkat-ekonomio ?

Konciza resumo por nefakuloj

Rapida skizo, bazita sur prelego de Suzan Ĝorĝ, vicprezidantino de ATAK, kiun mi aŭskultis en la lernejo kadre de kurso pri bioetiko.

Kio estas tutmondiĝo ?

Jen bela vorto, lerte elektita, kiu donas la impreson pri harmonia paca unuiĝo de la homaro. Tial necesas ĝin pli precize difini. Laŭ iu grava kompaniestro, la tutmondiĝo, "estas la libereco por lia grupo investi ĉie laŭplaĉe, estante kiel eble malplej ĝenata de la socialaj leĝoj". La cent plej gravaj transnaciaj entreprenoj regas la ĉefan parton de la merkato. Dua grava motoro estas la financaj grupoj : grandaj bankoj, asekurkompanioj, akcimakleristoj, ktp… Ĉiuj tiuj kontrolas 28 000 000 000 000 dolarojn. Sed nur 10% el tiu sumo reprezentas la du trionojn de la valoro de ĉiuj borse kotaciitaj entreprenoj en Sudameriko, kaj tri kvaronoj de ĉiuj aziaj (escepte de la japanaj). La pezo de tiuj entreprenistoj sur la lokaj merkatoj estas tiel granda, ke kiam ili decidas foriri, por investi en alia pli profitodona loko, ilia foriro provokas la disfalon de jam malstabilaj lokaj merkatoj. Tio okazis en 1995 en Meksikio, kaj en 1998 en Suda Azio. Nur Ĉinio kaj Malajio eskapis el tio, malpermesante la eliron de la kapitaloj. Tiuj transnaciaj entreprenoj havas fortajn ligojn kun la registaroj, kvankam pli kaj pli multaj entreprenestroj iĝas ministroj aŭ eĉ prezidantoj (Buŝ en Usono, la frato de Sarkozi, franca eksministro pri ekonomio, nun prezidanto de la reganta partio (UMP) , estas la vicestro de la mastra sindikato MEDEF…). Tiuj fortaj ligoj faciligas la alprenon de decidoj utilaj al la pligrandigo de la entreprena profito, sed la transnaciaj entreprenoj mem tute ne interesiĝas pri landa regado, ĉar tio alportas neniun profiton. Ili nur bezonas politikan situacion sufiĉe stabilan por ne perturbi la merkaton.


Kio estas la celo de ekonomio ?

Oni povus naive kredi, ke ĝi estas la studado de la plej efika maniero por kontentigi la homajn bezonojn. Sed la granda plimulto de la liberaluloj senhonte konfesas, ke la ĉefa celo de ekonomio estas la kreskigo de la profito kaj de la « valoro por la akciuloj ». La TTT-ejo de Merryl Lynch (meril linĉ) parolas pri 7 700 000 personoj « kun alta valoro », por kiuj laboras la tutmondaj ekonomiaj strukturoj.

Kiu diktas la mondajn regulojn ?

Pri ili respondecas la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso. Tiuj du organizoj estis fonditaj antaŭ la fino de la Dua Mondmilito, kun milde progresema celo, inspirita de la ideoj de Kejnso : ili celis prunti monon al la deficitaj landoj por helpi al ili plu partopreni en la monda komerco. Tamen, en la fino de la 70aj jaroj, la landoj el la suda duonsfero tro multe pruntis kaj ne reinvestis tiun monon en produktipovaj strukturoj, grandparte ĉar la subvencioj estis kaptitaj de mafiaj "elitoj", kiuj resendis ĝin al svisaj bankoj. Tiam la landoj el la Nordo decidis pri programo de struktura reĝustigo, konata sub la nomo de Vaŝingtona interkonsento : ĝi pruntis monon kun tre altaj interezoj por malebligi la inflacion, kaj puŝis tiujn landojn al eksportado. La problemo estas, ke se ĉiuj landoj eksportas la samajn varojn, la prezoj kompreneble sinkas : tio provokis la senhaltan malriĉigon de tiuj landoj, kvankam la elitoj prosperis aĉetante malmultekoste la privatigitajn entreprenojn. La rezulto estis katastrofa por la plimulto de la popolo. Alia rezulto de tiu strategio estas, ke la proporcio de freŝe alvenintaj mafiaj elementoj en la tiel nomata « elito » ne ĉesas kreski.

La monda organizo pri komerco (MOK) fiksas la internaciajn komercajn regulojn. Inter tiuj reguloj troviĝas la malpermeso pristudi la devenon de varo, kiu ebligus al la klientoj elekti ilin laŭ etikaj, kaj ne pure merkataj konsideroj. Pro tiu regulo la eŭropanoj estis punitaj pro la rifuzo importi bovaĵon el bestoj nutritaj per kreskhormonoj. La puno estis takso kontraŭ la franca fromaĝo Rokforo. Tio provokis la koleron de francaj ŝafbredistoj, kiuj ne komprenis kial oni punas ilin pro afero rilata al bova viando. Sed ĉar



Ĵoze Bove

neniel eblis kontesti tiun proceduron, anoj de unu el la terkulturistaj sindikatoj, gvidataj de Ĵoze Bove, malmuntis MakDonaldan vendejon por protesti kontraŭ tiu arbitra decido.

La reguloj de MOK ĉiam favoras la transnaciajn entreprenojn. Fakte, la liberalismo, kiu pretendas batali kontraŭ ĉiuj komercaj baroj, estas subtenata de ampleksa regularo rigora kontraŭ subpremataj ekspluatatoj.

Liberalismo kaj naturprotektado

Unu el la fundamentaj dogmoj de la ekonomia liberalismo estas, ke la ekonomia kreskado solvas ĉiujn problemojn per la mirakla efiko de « nevidebla mano » - « natura meĥanismo » de la kapitalismo laŭ iuj, « Providenco » (= Dio)laŭ aliaj. Fakte, la « nevidebla mano », favora nur al riĉaj kapitalposedantoj, havas kiel naturan efikon pliriĉigi riĉulojn kaj plimalriĉigi malriĉulojn. Ĝi kreas novajn « bezonojn », do novajn laborpostenojn por produkti tiujn varojn. La hoko en la ezoko estas,

ke senlima kreskado sur planedo, kies riĉaĵoj nepre estas limigitaj, levas kelkajn problemojn. Nun la problemo atingas tre danĝeran nivelon, ĉar la homo vere iĝis kapabla komplete detrui sian vivmedion per senpripensa troekspluatado de la riĉaĵoj, kiuj ne plu havas la tempon reproduktiĝi. Nun ne plu temas nur pri certigo de decaj vivkondiĉoj por la ekspluatatoj, sed eĉ pri pluvivo de la homaro entute. Tial la aktiva batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo iĝas pli urĝa ol iam ajn antaŭe.

Kiel kontraŭbatali tion ?

Ne estas malfacile imagi solvojn por la tutmondaj problemoj. La malfacilaĵo estas la aplikigo de ĉiuj brilaj ideoj. Necesas krei sufiĉan fortorilaton por postuli la aplikigon de decidoj, kiuj rekte kontraŭas la interesojn de la reganta klaso. Ĉiuj sociaj progresoj estis atingitaj per sociaj bataloj. Povas esti, ke troviĝas kelkaj bonkoruloj inter la mastroj, sed la fundamenta problemo estas la ekzisto de klaso de posedantoj, kiuj nepre volas konservi la produktorimedojn, sub la preteksto, ke la stulta popolo neniam estos sufiĉe matura por regi sin mem. (Mi substrekas tiun frazon, kiu klare indikas, ke la ATAK movado estas senambigue KLASBATALA, eĉ se tiu vorto fortimigas multajn novulojn, kiuj kredas, ke ili estos pli « allogaj » forgesante sian parencecon kun la tradicia socialisma movado, makulita per sango kaj diversspecaj perfidoj.) Praktike necesas krei sufiĉan fortorilaton, kiu bremsos la aspirojn de la reganta klaso. Neniam en la historio la laboristaro akiris avantaĝojn sen batalo. Tiun rezistan fenomenon oni nomas « klasbatalo », ĉar ĉefe temas pri la batalo inter du klasoj : ekspluatantaj klasoj, kiuj nepre bezonas kreskigi sian kapitalon, kaj ekspluatataj klasoj, kiuj simple nur bezonas vivi. Unu el la ĉefaj rimedoj, proponitaj de la ATAK-movadanoj, estas impostado de la translandaj kapitalmovoj, cele al redistribuado de la riĉeco. Tiu imposto donis ĝian nomon al la movado mem laŭ la nomo, « Tobin », de la aludinto (kiu poste surpriziĝis, ke lia aludo estas prenita kiel propono).

Iom jukis min la aserto de S. Ĝorĝ, ke « Eŭropo havas respondecon por esti la pinto de tiu nova kontestado. » Denove aŭdiĝas la malnova konfuzo inter universalaj valoroj pri homaj rajtoj, kaj la loko kie ili sukcesis relative bone disvolviĝi. Jen tipa ekzemplo de nova eŭropskala naciismo, kiu klopodas kredigi, ke la bonaj eŭropanoj, sciante pli bone ol la aliaj kiel efike batali kontraŭ la kapitalismon, devas transdoni sian solvon al la cetero de la homaro. Ĉu do pensantaj homoj ne ekzistas alie en la mondo ?

Kia estonteco por la ATAK-movado ?

Suzan Ĝorĝ jese respondis al mia demando, ĉu ŝi konsideras ATAKon kiel specon de nova socialdemokratio. Tio klare montras la limigon de tiu movado. Jam delonge la socialismaj aŭ komunismaj partioj, kiuj apartenas al la registaroj, ne plu meritas sian nomon, ĉar ili ne plu celas la abolon de la kapitalismo per reformoj de la ŝtataj regularoj, sed nur la mildigon aŭ « humanigon » de la homekspluatado. Tiu ĉi movado almenaŭ montras klare la neakordigeblon de kapitalisma sociordo kun mondo, en kiu la riĉaĵoj estus egale disdonitaj al la homoj.
Grava forto de tiu ĉi movado estas ĝia eduka kaj kleriga karaktero. Jam delonge la tradiciaj politikaj partioj plejparte rezignis pri tiu flanko de la laboro. Tamen oni povas demandi sin kiu havos la privilegion kleriĝi, kiam la lingva problemo estas tute prifajfata. Sed ĉiuokaze, la ekzisto de tia movado, kiu penas prikonsideri la problemojn laŭ tutmonda skalo, kaj ne strebas al povoalpreno en iu lando, kiel la tradiciaj politikaj partioj, estas bonvena. Tio almenaŭ utilas kiel parta kontraŭpezo al la klopodoj de la novdekstraj movadoj, kiuj same preferas agadi ekster la tradicia politika scenejo, kaj eĉ logas « maldekstrulojn » per lerte ellaborita vortumado (vd SRon 2003 por pliaj detaloj).
Tre amuzis min la preskaŭ indigna reago de Suzan Ĝorĝ, kiam mi menciis la anarĥiistojn, kiuj jam inklinas al la apartiĝo disde la cetero de la alimondistoj, konsiderante ke tiuj ĉi jam submetiĝas al la postuloj de la « granda kapitalo ». Ŝiaj ĉefaj argumentoj estis, ke « ili ne estas multnombraj » (alivorte : ni fajfas pri la ideoj de la minoritatoj, eĉ en niaj vicoj... meditinde por la naivuloj, kiuj kredas, ke Esperanto ricevos subtenon de tia movado...). Do tiuj, kiuj timas ke ATAK konkurencas SATon per sia supertendececo trankviliĝu. Ŝi poste klopodis klarigi al mi, ke la ATAK movado absolute rifuzas kunlabori kun perfortemuloj ! Ĉu do tiel klera persono vere kredas, ke anarĥiismo limiĝas al senpripensa bomboĵetado ?
SAT certe havas ion por lerni el la alimondismaj movadoj, kiuj kapablas veki la ĝeneralan intereson pri solvo de la sociaj malegalecoj, kaj certagrade plenumas valoran klerigan laboron. Sed ni ne postsekvu ilin kredante, ke ili konsistigas panaceon. La tradicia strukturo de SAT donas al ĝi bazdemokratiajn avantaĝojn, kiujn verŝajne eĉ ne prirevas la ceteraj alimondistoj. Ni do plu fosu nian sulkon, klopodante altiri ĉiujn bonvolemulojn al ĝi !

Vinko Markov

Menskateno

Tutsole en sia ĉambreto
Kun nur studlibroj sur ferbreto
Infano preskaŭ dekokjara
Sopiris al la hejm' plej kara.

Spit' la studad' por task' merkreda
Ĉar pri sukceso plu senkreda
Memoras pri la dir' de Panjo
Zorgas pri l'poezi-semajno

Sed konscienc-riproĉo venas
La verkon de la knab' venenas
Li post tristrofa provribelo
Devas re al la studmalhelo...

Vito Markov

VARBU NOVAJN MEMBROJN AL SAT !

NUR FORTA SAT POVAS PLENUMI SIAJN CELOJN!

SUBTENU VIAN ASOCION

IOM PLI PRI DIEGO GARCIA

En n-ro 1196 de Sennaciulo aperis tre interesa artikolo titolita «Cunama katastrofo en Suda Azio». En ĝi oni komentis la neeblecon averti la viktimojn pro la rapideco laŭ kiu moviĝis la cunamo kaj mencias la fakton ke estis neniu vundito inter la militistoj de la usona militbazo en insulo *Diego Garcia*.

Releginte diversajn informojn aperintajn en la gazetaro mi decidas skribi kelkajn liniojn por aldoni al tiu artikolo iom pli pri tiu jam fifama insulo.

Laŭ tiuj informoj viktimoj de la cunamo denuncas la Usonan Meteologian Servon ĉar sciante alvenon de la katastrofo ili faris nenion por averti la frapotajn landojn kaj tiel eviti la morton al miloj da homoj. Kiel pruvo oni mencias la fakton ke la usona militbazo en Diego Garcia estis avertita pri alveno de la ondego. Ĝi atingis la insulon post kvin horoj kaj tio ebligis savon al la militistaro. Jen demando, se estis maniero kaj tempo por averti la usonan militbazon kial oni ne faris samon rilate aliajn landojn?

Alia afero rilatanta Diego Garcia-n estas ties uzo kiel sekreta prizono. Diversaj organizoj jam denuncis ke tiu militbazo estas ĉenero, kune kun Guantanamo kaj Bagram en Afganio, de reto establita de la usonaj sekretaj servoj por enkarcerigi homojn sen juraj garantioj tra la tuta mondo. Eble ekzistas multaj tiaj pri kiuj oni ankoraŭ nenion scias sed pri kio ni jam legis estis pri la torturoj kiujn suferigas la usonaj okupaciantoj al ties enkarcerigitoj.

Diego Garcia estas do alia fifama ekzemplo de la imperiisma politiko de Usono, kiom karaj estas por ĝi siaj soldatoj kaj kiom malmulte valoras la cetero de la homaro kaj ties rajtoj.

Nikolas Xil Carvalho (34316)

AIDOSO EN AŬSTRALIO

Kvankam aidoso ankoraŭ ekzistas en Aŭstralio, ĝi ne plu disvastiĝas same kiel antaŭ 15 aŭ 20 jaroj.

Pro la reklamoj pri volontuloj de la Viktorio Aidoso Konsilio en magazenoj kaj televido, kaj la kuraĝigo de amiko, kiu jam estis volontulo, mi volontulis post emeritiĝo, pensante ke tiel mi povas redoni mian helpon al la socio. Mia amiko prezentis min al la regiona oficisto de la okcidenta parto de Melburno.

Antaŭ 15-20 jaroj estis pli ol 400 volontuloj en Melburno Nun restas nur ĉirkaŭ 200 (4-jaruloj aŭ pli, plejparte emeritoj) ĉar dank'al novaj bonaj medikamentoj ne tiom multe da malsanuloj estas tiom handikapitaj ke ili ne kapablas piediri, kuiri aŭ veturi per publikaj transportiloj.

La aidoso malsanuloj renkontigas en speciala sancentro en Fairfield Domo, kiu similas al malsanulejo. Tie troviĝas psikologoj kaj konsilistoj. La volontuloj ne nur helpas ilin fizike sed ankaŭ kondutas sin kiel amikoj.

Tiun pozitivan rezulton oni atingis per informado kaj edukado. Gravas ke misinformoj kaj antaŭjuĝoj estu forigitaj, ke neniu plu kredu ke aidoso disvastiĝas per manpremo, uzo de sama kulero, forko aŭ telero kiel malsanulo. Gravas ke la malsanuloj ne estu diskriminaciitaj, ĉar aidoso sendistinge frapas. Tiucele la volontuloj disdonas informflugfoliojn kaj kondomojn en publikaj necesejoj David, kiu mem suferis pro aidoso dum 20 jaroj eldonis libron pri sia vivo, kiu estis vaste diskonigita inter alie pere de populara televida programo SBS. Unu virino, Michelle, regule vizitas mezlernejojn por paroli pri aidoso kaj sekura seksumado.

Kelkaj aŭstralianoj faras la saman laboron en aziaj landoj, ĉefe la informlaboron : preventi kaj eduki estas la magiaj vortoj.

Se la situacio pliboniĝis en Aŭstralio, certe ĝi povos pliboniĝi ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Mi aparte pensas pri Afriko kaj la terura priskribo farita de la instruisto, Oliver, kiu venis de Zimbabvo por instrui kadre de nia lasta somerkursaro en Adelajdo. Ĉu lukto kontraŭ aidoso ne estas parto de nia klasbatalo?

Laszlo Farkaŝ



Akra plumo

GERMANAJ VIRTOJ EN LA NEĜO

el la gazeto Nova Germanio: 12/13.03.2005

De Tomaso Wieczorek

Neniam niaj biatlonistoj estis tiom valoraj kiel nun. Estas ne nur tiel, ke la nombro de la senlaboruloj kaj malriĉuloj same kreskas, kiel la energiprezoj – du semajnoj antaŭ Pasko ankaŭ ĉe la vetero pri printempo ne estas eĉ aludo.

Normale sportaj sukcesoj helpas nin en tiaj situacioj al pli bona humoro. Sed anstataŭ tio ni travivas koruptajn ludgvidistojn, preskaŭ kompletan fiaskon en la piedpilka Eŭropa Ĉampionado, sinkflugon de niaj famaj skiagloj kaj eĉ fuŝstarton de nia tiom perfekta Ŝumi. Kiel bone tio estas, ke ni havas almenaŭ nian paradosporton biatlono, pli precize dirate, nian ministron por defendo, nian Peter Struck. Neniu aktiva servo en eksterlando estis iam tiom sukcesa, kiel la nuna ĉe la Mondĉampionado en Hochfilzen.

La precipa signo kaj sukcesosekreto estas la korpusa spirito. Se parto el ili ne havas bonan tagon, la alia superatutas sin mem. Ĉe la trejnistoj stabserĝento Frank Ullrich povas esti tre kontenta pri ĉefserĝento Michael Greis, kaporalo Ricco Groß, ĉefserĝento Andreas Birnbacher, staba subofciro Daniel Graf kajla profesia sportisto Sven Fischer (laŭ proraj eldiroj „finance sendependa"). Sed ankaŭ la inobataliono de trejnisto Uwe Müßiggang, nome ĉefserĝento Andrea Henkel, kaporalo Katrin Apel, kaporalo Kati Wilhelm, staba subofociro Simone Denkinger, kaj la Federacia limprotekta policĉefmajstro Uschi Disl entuziasmigas la adeptojn kaj donas al la junularo stimulan ekzemplon.

La mesaĝo estas tiu: Kiu ne permesas frustraciojn al si, ankaŭ en tempoj de krizo povas havi sukceson. Estu do ne kiel la granda amaso de la infanoj: senedukitaj, daŭre plendantaj, sen perspektivo pri laboro kaj plenaj de futurtimo. Prefere estu kiel niaj biatlonistoj: diligente, persista, celkonscia, celtrafa!

Tradukis Donjo & Cez!

SAT eH

Sennacieca Asocio Tutmonda en Hispanio

KIO PRI SAT EN HISPANIO?

De temp' al tempo aperis en "Sennaciulo" kaj ĝenerale en la SAT-medio diversaj informoj pri la movado ligata al SAT en la hispana regno, kelkfoje rilate al agadoj, sed plejofte al konfliktoj. Evidentiĝas tamen ke la okazintaĵoj kiuj kondukis al la ekzisto de du asocioj kiuj sin konsideras membroj de la laborista Esperanto-movado, restas konfuzaj por multaj SAT-anoj, inter kiuj ankaŭ multaj kun respondecoj en la SAT-organoj, ĉar aliel oni ne komprenas kiel la informoj pri konfliktoj daŭras kaj eĉ kreskas. Tio ne estus la volo de la subskribantoj de tiu ĉi artikolo, membroj de la asocio nomata ĝuste SAT-en-Hispanio, kiuj estus preferintaj ke oni sciu nur pri niaj agadoj favore al Esperanto kaj specife al la laborista movado. Eble pro tio ni neglektis la eksplikon de la fono kiu kondukis al la en multaj sencoj bedaŭrinda situacio, kun la sekvo ke la afero plu treniĝas, kun risko de paralizo en la agado de SAT mem.

Ni memoru iom la historion, sen troaj detaloj, por scii pri la fono. Kiel estas konate, la nuna movado ligita al SAT estas relative nova en Hispanio, pro la historia tranĉo kiun kaŭzis la diktaturo de Franco. Post ties morto eblis ĝin denove renaski, kaj en 1986 oni eĉ organizis kongreson de SAT en Sant Cugat del Vallés. Iom poste oni fondis Hispanan Asocion de Laboristoj Esperantistaj (HALE), unu el kies ĉefaj – kaj la plej konata – agado estas la eldono de bulteno "Kajeroj el la Sudo", kiun kunredaktis kun alta kvalito du tre konataj esperantaj verkistoj, la movada historiisto Antonio Marco Botella kaj la poeto membro de la "Ibera Skolo" Miguel Fernández.

Ni ne deziras priskribi detale la historion, pri kiu eblas legi en la libro "Laboristaj Kronikoj", de la menciita Antonio Marco, kiun eldonis SAT-Broŝurservo. Grava turnopunkto tamen estis la ŝanĝo en la redaktoreco de la bulteno, kiun transprenis Jesuo de las Heras. De tiam la kvalito videble malaltiĝis, sed tio ne estas la kritika afero: ja ne ĉiuj taksas egale la kvaliton de gazeto, kaj krome ni agnoskas la malfacilecon regule redaktadi bultenon de modesta asocio, sen grandaj rimedoj. Pli grave estas ke la revuo fariĝis la ilo per kiu la redaktoro gvidis siajn personajn batalojn. Jen kontraŭ la gvidorganoj de la asocio mem, ekzemple per kritikoj kontraŭ la prezidanto de la asocio aŭ aliaj kamaradoj, jen rekte kontraŭ SAT, speciale post la brua foriro de la redaktoro mem el SAT en du okazoj.

Tion akompanis la videbla ŝanĝo en la ideologia karaktero de la artikoloj. Eble por nehispanoj multaj nuancoj estas malfacile percepteblaj, sed kiam la recenzataj libroj estas tiuj de Federico Jiménez Losantos (ĵurnalisto kiu nun fariĝis la ĉefa intelekta referenco de la plej radikala dekstro en Hispanio, kondukanto de la matena novaĵprogramo de la radiostacio de la hispana episkoparo), César Vidal (historia disvastiganto de plej tradicia vidpunkto kaj ĵurnalisto respondeca de la vespera programo de la sama radio) aŭ Pío Moa (eks-maŭisto, nun reviziista historiisto de la ekstrema dekstro, kiu famiĝis pro sia akuzo al la respublikanaj gvidantoj pri la komenco de la hispana civila milito), kaj kiam la recenzoj estas klare pozitivaj, oni povas imagi ke io ne iras glate en progresema asocio. Ne strange, se oni konsideras la ŝovinismon hispancentrisman ornamintan multajn el la artikoloj; estas en tio probabla miskompreno: en la hispana lingvo oni uzas la vorton *nacionalismo* preskaŭ sole por la periferiaj naciismoj (kataluna kaj eŭska), kaj la hispana dekstro povas konsideri ke ili ne estas naciistoj eĉ se la hispana patriotismo aperas en ĉiuj iliaj diroj. Tiel eblas klarigi diversajn agrese ŝovinistajn artikolojn aperintaj en Kajeroj el la Sudo.

La guto kiu plenigis la glason estis la artikolo de falangisto (hispana Falango estas la partio responda al la itala Fascio, plu ekzistanta kaj laŭleĝa en Hispanio, kvankam ege malforta kaj minoritata) aperinta en numero 46 de "Kajeroj el la Sudo" (julio 2000). Se grave estis tiu apero, ankoraŭ pli estis la eksplikoj donataj post la protestoj kiujn ĝi vekis: prezidanto de la asocio kiu pravigas ĉion sub esprimlibereco, kvazaŭ por la asocio ĉio validus kaj posedus la saman valoron, aŭ sekretario kiu rakontas ke li mem vizitis kunvenon de la falangistoj kaj trovis ke ili estas demokrataj kaj havas interesajn aferojn por rakonti.

Se oni aldonas ke la redaktoro havis la malbonan kutimon respondi al kritikaj artikoloj tuj post ilia apero, kaj ke la pronomo "mi" fariĝis ĉieestanta, oni komprenas la nomon moke ricevitan "Kajeroj de Jesuo". Pardonu ke ni nun personigu la aferon, sed la problemo iĝas malpli komprenebla se ni ne mencias la gravan rolon kiun prenis la redaktoro de la revuo. Multaj homoj jam konas lian febran polemikemon, kiu montriĝis inter alie en du (!) foriroj el SAT, en ambaŭ kazoj sekvitaj de multa bruo. Tiu polemikemo kaj lia ruzeco montriĝi ĉiam kiel viktimo de la agoj de la ceteraj, malebligis amikeman etoson inter la hispana SAT-anaro, kaj forprenis multe da energioj kondukeblaj al aliaj agadoj. Tiel, la sekvo estis ke la hispanaj SAT-anoj aŭ forlasis la asocion supozatan samspiritan kun ĝi, HALE, aŭ neniigis sian agadon ene de ĝi aŭ, se ne mem HALEanoj, preferis ne aktivi en asocio kies ekstera videblo en progresemaj medioj de la lando kaj ĝia agado por Esperanto kaj por SAT estis simple nula.

La nuleco de HALE videble montriĝis konekse al la organizado de la kongreso de SAT en Alikanto en 2002, kie HALE havis tute neniun rolon. La redaktoro eĉ ne partoprenis la kongreson, kvankam li ja aperis en la kongresejo, ŝajne simple por fari raporton por sia bulteno.

Estis dum tiu kongreso kiam la grupo da hispanaj SATanoj aŭ homoj simpatiantaj al ĝi, konstatinte la neelteneblan situacion, decidis ke la afero ne povis tiel daŭri. Ni petis unue ke la tiama estraro de HALE lasu sian postenon, kaj kiam tio ne efektiviĝis, ni decidis ekagadi sendepende de ĝi.

La sinsekvo de la okazaĵoj portis nin al la kreado de alia tute aparta asocio. Tio ĉi estas eble la agado malplej komprenita de multaj el la kamaradoj. Diversaj homoj en SAT montris al ni sian opinion ke ni estus devintaj daŭrigi nian agadon ene de HALE. Ni konscias ke de ekstere tio povas aspekti kiel valora alternativo, sed en la praktiko ni juĝis ke tio ne eblis. Unue, ĉar, kiel dirite, multaj estis jam forlasintaj la asocion, aŭ eĉ ne eniris en ĝin, sed la ankoraŭ HALEanoj tute ne emis dediĉi siajn energiojn al internaj bataloj. Ni preferis la agadon por Esperanto kaj por SAT, kaj tio tute eblis sen la uzo de la nomo HALE, kiu al la medioj kie ni deziris disvolvi nian agadon signifis tute neniom. Ni estus povintaj agadi simple je la nomo de SAT, aŭ per tiucela rondo, sed pro praktikaj kialoj derivitaj de la hispana leĝo (ekzemple por havi bankokonton kaj

poŝtokeston) ni decidis oficialigi la rondon kaj krei memstaran asocion. Ĝi ricevis duoblan nomon, kiu klare montru kiuj ni estas, kaj tial por agi en esperantistaj medioj ni nomiĝas simple SAT-en-Hispanio (SATeH), dum por eksteraj medioj ni uzas la *frapan* nomon "Maldekstro kaj Esperanto".

Ni komencis baldaŭ agadi, en diversaj direktoj: ni kontaktis progresemajn asociojn en la hispana ŝtato, kun kontentigaj respondoj, ni propagandis nian lingvon kaj nian movadon en diversaj lokoj, kiel la festo de la Komunista Partio aŭ la tutmonda kongreso de la Anarĥiista Internacio, ni publikigis dulingvan retpaĝaron, kun bona propaganda efiko, aŭ ni organizis libroservon de la publikigaĵoj de SAT kaj SAT-Broŝurservo, kiu interalie taŭgis kiel kongresa libroservo dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso de Bilbao, por citi nur kelkajn el la iniciatoj pri kiuj ni pli fieras. Ni estas kontentaj kun nia varbagado, eĉ se multo restas farenda, sed ni almenaŭ plantis la unuajn semojn de la revivigo de la laborista E-movado en tiu ĉi lando.

Ni deziris pravigi nian ekziston per nia agado, ne per niaj deklaroj kaj opinioj, kaj ni pensas ke SAT aprobis nian vidpunkton, kaj tre ĝojis kiam SATeH estis agnoskita kiel LEAo konvencie ligita al SAT en la Kongreso de Ĉaŭdefono, en 2003.

Dekomence ni agis ne nur sendepende de HALE, sed sen atenti pri ties deklaroj. Se la paĝoj de Kajeroj de la Sudo tre ofte kaj diverse parolis pri SATeH, nek nia retpaĝo nek nia «Informilo» iam aludis la internan debaton. Ni ne emis perdi nian malabundan tempon en tiaj aferoj, kiujn ni konsideris sensignifaj, kaj eĉ kiam la aludoj estis maljustaj aŭ malĝustaj ili ricevis nur silenton. Eĉ kiam oni petis nian opinion pri la rompo de la ligo inter SAT kaj HALE ni preferis sindeteni. Ni simple pensis ke nia agado pravigus nian ekziston, kaj ke homoj ekster nia malgranda rondo, kaj specife nehispanaj SATanoj, plej valorigus nian silentan agadon ol alies bruan agitadon.

Nun ni ne estas tiom certaj pri la lasta aserto. Estas nun certe ke ni ne sufiĉe bone klarigis nian decidon apartiĝi de HALE, kaj kelkaj homoj plu demandas pri tio, kvazaŭ la historion eblus modifi. Sed ĉefe ni havas la impreson ke ni transplantis la problemojn de la hispana laborista movado al la tuta SAT-movado. En la lastaj monatoj, oni permesis ke Jesuo de las Heras triafoje realiĝu al SAT, sen antaŭe averti la hispanan peranton, kaj, kompreneble, li tuj komencis brui pri sia propra situacio en la asocio. Tio ne estus granda problemo se oni estus lerninta de antaŭaj lecionoj, kaj oni lasus la organizajn aspektojn ene de siaj limoj. Sed ŝajne iuj respondeculoj de SAT decidis atenti precipe la internajn kverelojn, kaj repensi la rilatojn kun la hispana SATanaro.

Ni pensas ke tio estas eraro. SAT nur estos signifa asocio, kaj kapablos altiri al si agademulojn nur kiam ni ĉesos rigardi nin mem, kiam la asocio disvolvos klaran agadprofilon kaj kiam ni montros al la ekstera mondo nian volon ŝanĝi la socian, ekonomian, kulturan kaj lingvan ordon nun ekzistantan. El SATeH ni pensas, modeste sed firme, ke ni povas montri la ĝustan vojon por tio.

SAT-en-Hispanio, marto 2005.

Konstato de ĜK de SAT, 2005-03-06

Statuto N-ro 16 de la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) difinas rolon de la Ĝenerala Konsilantaro (ĜK) helpi al la Plenum-Komitato (PK) per informoj kaj konsiloj, observi kaj kontroli la agadon de la PK, kaj donas rajton al la ĜK, se ĝi "rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta kaj laŭstatuta, konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per la presorgano" (t.e. Sennaciulo).

Laŭ SAT-statuto N-ro 16, la ĜK, je 2005-03-06 (per 6 voĉoj por, 6 kontraŭ, 1 sindeteno, kaj decida aldona voĉo de ĜK-sekretario) konstatas, ke la PK agis kontraŭstatute je la 14-a de Decembro 2004, forpreninte de SAT-membro Jesuo de las Heras sian membrecon dum 2005, sen laŭstatuta proceso, tiel farinte atencon kontraŭ la rajton de ĉiu membro esti traktota laŭstatute.

La ĜK tial konsilas al la PK tuj nuligu tiun kontraŭstatutan decidon.

Post diskutado inter la 10-a de Januaro kaj la 5-a de Marto 2005, la ĜK adoptis la jenan rezolucion proponitan de sia sekretario, Stano Keable:

Ke la decido de la PK je la 14-a de Decembro 2004 pri Jesuo de las Heras "dum la jaro 2005 rifuzi lian kotizon, per kio aŭtomate dum tiu ĉi jaro li ne plu estos membro de SAT ekde la 1-a de Januaro 2005 , ktp" estas kontraŭstatuta.

Voĉoj de ĜK-anoj: 6 POR, 6 KONTRAŬ, 1 SINDETENO.

POR LA REZOLUCIO: 6 Ĝ.K-anoj:
Luiz Alberto de Oliveira Coelho (Kategorio A : Reprezentanto de geografia sektoro, referendume elektita de la tuta SAT-anaro);
Michel Duc-Goninaz (Kat.A);
Vilhelmo Lutermano (Kat.A);
Yamasaki Seiko (Kat.A);
Ron Lynn (Kat.Ĉ : Rep. de SATEB, anglalingva Laborista Esperantista Asocio);
Stan Keable (Kat.B : Konflikt-Komisionano 2004-05).

KONTRAŬ LA REZOLUCIO : 6 ĜK-anoj:
Ivanka Stojanova (Kat.B : KK-ano 2004-05);
Bernie Heinze (Kat.B : KK-ano 2004-05) ;
Vincento Charlot (Kat.C : Rep. de membraro de la PK-urbo, Parizo) ;
Carlo Bourlot (Kat.Ĉ : Rep. de itallingva LEA);
Henri Masson (Kat.Ĉ : Rep. de SAT-Amikaro, franclingva LEA);
Gary Mickle (Kat.Ĉ : Rep. de LEA/G, germanlingva LEA).

SINDETENO: 1 ĜK-ano:
Pelle Persson (Kat.Ĉ : Rep. de svedlingva LEA)
Decida aldona voĉo de ĜK-sekretario Stano Keable, kiu prezidas la diskuton, estis POR.

Respondo de la PK:

1. Surbaze de la artikolo 7 de la statuto, la PK decidis rifuzi la membrecon de Jesuo de las Heras por la jaro 2005.

2. Du el tri membroj de la Konflikt-Komisiono voĉdonis kontraŭ la konstato de la Ĝenerala Konsilantaro, kiu do substituis siajn konstaton kaj konsilon al la decido de la Konflikt-Komisiono.

3. Ne ekzistas statuta aldona voĉo de sekretario de K.K. kaj ĜK-aro.

4. En la ĉi supra kalkulo de la voĉoj, mankis la voĉo de SATEH, kies reprezentanto, k-do Kani, voĉdonis kaj post lia voĉdono la definitiva rezultato estas:

"La decido de la PK estas kontraŭstatuta" : Jes 6, ne 7 kaj 1 sindeteno.

5. La decido de la PK restas valida kaj aplikita.


La P.K. de SAT

Irassyaimase !

(japane : bonvenon !)

aŭ Tinĉjo en Japanio (n°4)

Jam de pluraj tagoj mi nun estis en Japanio en la bela urbo Kioto kaj kun ĝojo konstatis ke la suno ĉiun tagon bonvenigis min. Mi sentis min vere bonvena en la lando de la leviĝanta suno. Masako apartenas al malgranda grupo de intelektuloj kiuj studas pri virinaj aferoj ĉe *Uzi-Yamasen-Societo*. Por partopreni al la studgrupo ni devis veturi al Uzi. La urbeto Uzi estas ne tre granda urbo je distanco de 1 horo trajne, for de Kioto. Uzi estas famkonata pro la verda teo kiun oni vendas en la diversaj vendejoj. La tuta urbo estas sub kupolo de teodoro, tre aparta flaro kiu iom donas senton ke iu uzas haŝiŝon. La stacidomo troviĝas je la dekstra flanko de



Monumento de Murasaki Sikibu
kiu surhavis 12 kimonojn

rivero, rivero kiu donas al la urbo trankvilon kaj belecon. Por atingi la urbeton, ni devis transpasi tre belan lignan ponton. Meze de la ponto mi haltis por rigardi al la pejzaĝo kaj la kvazaŭ pentrita naturo. Venante al la maldekstra flanko de la rivero ni haltis ĉe tre ĉarma monumento de MURASAKI Sikibu kiu surhavis 12 kimonojn, bildo pri riĉeco. Kara Masako ne tre entuziasmis kiam mi demandis ŝin pri la fama vestaĵo de Japanio, la kimono. "Kimono, ŝi diris estas simbolo de subpremo de la japanaj virinoj". Ŝi klarigis per ekzemploj al mi kial kimono estas vestaĵo de riĉuloj kaj por ke mi nepre komprenu, ŝi dum la dua vizito al Kioto, je la fino de mia vojaĝo, akompanis min al ateliero kie oni fabrikas kimonojn por riĉaj homoj. Estis la unua fojo ke mi vidis la fajron de revolucio en la okuloj de mia kara kamaradino kaj la planon aĉeti kimonon por mia edzino, mi rapide forgesis.

Eble estas iom strange por legi, sed mi havas iun malamikan-amikan rilaton kun necesejoj. Belgio, ĉu eble pro la influo de la eklezio, apenaŭ havas publikajn necesejojn. Male, mia kara Parizo, kiun mi regule vizitas, dorlotas homojn, kiuj havas naturan bezonon, uzi necesejon. Ĉiuj, kiuj iam vizitis Parizon konas la aŭtomatajn necesejojn ĝenerale sufiĉe purajn, sed ne tro konfortajn. Nu, en Uzi, proksime al la bela monumento de la princino mi iris al la plej bela kaj pura necesejo kiun mi iam vizitis en mia tuta vivo. Bedaŭrinde mi ne kuraĝis fari foton, sed nun mi bedaŭras ke mi ne faris foton por montri al la urbestro de Antverpeno, por ke li sciu ke necesejo (kaj la nomo parolas por si mem) eblas sen ke oni rompu la belecon de la stratbildo.

Pere de vojo kiu sekvis la riveron, ni pasis al famkonata templo, kiun Masako nomis la "egala templo" ĉar jen vidu ambaŭ flankoj de la templo estis kvazaŭ spegula bildo, de unu kaj alia. La templo kiun ni la postan tagon vizitis havas sian bildon sur monero de 10 enoj kaj estas konata en tuta Japanio. Nia celo tamen estis la gastejo "Flordomo", kie vivis YAMAMOTO Senzi (Yamasen), parlamentano de Laborista-Kamparana Partio, mortigita de dekstrulo pro progresemo en 1929.



La tomboŝtono de Jamasen

La tagon poste Masako kaj mi reiris al Uzi por viziti la tomboŝtonon kaj malgrandan muzeon de la fama kamarado. Multaj maldekstruloj, socialistoj de diversaj tendencoj vizitas la faman tombejon kaj la historio pri Yamasen meritas apartan eseon, kiun mi intencas verki por nia Sennaciulo kiam mi havos denove iom da trankvilo kaj tempo en la vivo.

En la ĉambro de Haruko, amata filino de Yamasen, ĉiumonate okazas studkunsido de Uzi-Yamasen-Rondo, unu el la studsocietoj pri Yamasen tra la lando. Ĉi-jara studtemo estas "Sekso-edukado". Yamasen estis ne nur politikisto por homaj rajtoj, sed seksologo kaj biologo. La preleganto, profesoro ODAGIRI Akinori, pritraktis la temon "Genro kaj Sekseco" en komparo inter Japanio kaj aliaj landoj. Do, evidentas ke li faris al mi demandojn pri la temo kiel mi spertas ĝin en Belgio. Feliĉe mi povis doni al ĉiu demando respondon. Donace mi ricevis de la profesoro libron en la angla, kiu pritraktas virinajn rajtojn en Japanio.

Kun surprizo mi povis legi en ĝi, ke la (laŭ mia tiama opinio) novliberala Japanio estas, kiam rilatas virinaj rajtoj, multege pli progresema ol mia Belga lando.

Alia surprizo estis ke en iu momento Japanviro alparolis min en mia denaska lingvo. Vere estis stranga, tiel for de Belgio, kaj persono alparolas min en plej perfekta nederlanda. Ni sciu ke la nederlanda estas malgranda lingvo kiu en la strukturo de la Eŭropa Unio apenaŭ havas signifon kaj se ni, la nederlandlingvanoj ne batalas por niaj lingvaj rajtoj ni certe perdos post kelkaj jaroj nian lingvon favore al la angla. Feliĉe ni povas uzi niajn spertojn kiujn ni akiris kiam ni kontraŭbatalis la hegomonion de la franca en niaj regionoj, do perdi kuraĝon ne jam necesas. Ankaŭ grava estas ke ni laboristoj devas konscii ke lingvaj rajtoj estas grava parto de laboristaj rajtoj. Bedaŭrinde, precipe la komunistaj kamaradoj apenaŭ atentis pri tiuj rajtoj. Homoj kiel Karl Marx, la verkanto de "la Komunista Manifesto" kaj ankaŭ gravuloj kiel Antonio Gramski ne komprenis la gravecon de lingvaj rajtoj en la laborista batalo. Eble pro tio ili neniam komprenis la valoron de Esperanto kiel universalan batalilon kontraŭ kapitalismo?

De Uzi, Masako kaj mi trajne reiris al Kioto, ĉar posttagmeze okazis por mi tre grava prelego en Doosisya-Virina Universitato. Bicikle Masako kaj mi iris al la universitato, kie bonvenigis nin kelkaj amikoj de Masako kaj profesoro KATAYAMA Hisaaki. Mi estis sufiĉe nervoza, ĉar kiel jam kelkfoje dirita, mi ne estas profesia preleganto kaj krome mi parolis en Esperanto, lingvo kiun mi daŭre ne regas same bone kiel mian gepatran lingvon. Temo de la prelego estis "Vesperjaroj de belga laboristo". La aŭskultantaro estis tre diversa, virinoj, viroj, junaj, maljunaj, sed ĉiuj montris grandan intereson pri la prelego.

La afero denove bone funkciis. Mi faris mian prelegon pri tre serioza kaj sufiĉe malfacila temo uzante Esperanton kaj Masako lerte kaj vigle tradukis al la japana. Post la prelego estis paŭzo de 15 minutoj kaj por esti honesta, mi ne antaŭvidis multajn demandojn poste. Sed jen, unu post alia homoj faris demandojn pri mi, pri Belgio, pri diamantoj pri laborcirkonstancoj en Belgio, pri sociala sekureco kaj laboristaj rajtoj en Belgio. Respondi ne estis malfacile por mi, ĉar ni pritraktis temojn kiuj jam prenas mian atenton dum mia tuta aktiva vivo. Laborista lukto, laboristaj rajtoj, sindikataj bataloj ktp. Mi troviĝis sur konata tereno. Nenio povis okazi al mi. Sed… mia kara amikino Masako, ŝi devis traduki ĉion tuj al la japana.

Ĉiam kiam ŝi lerte tradukis miajn frazojn aŭ demandojn de la partoprenantoj mi pensis: "Kia propagando por Esperanto!". Neniu faldfolio, neniu afiŝo, neniu propagandilo povas superi la propagandon, kiun ni rekte faris uzante la lingvon, kvazaŭ ĝi estus nia hejmlingvo. Eĉ pli ol ĉe Amnestio Internacia en Nara ni montris ke Esperanto funkcias. Esperanto estas tre utila lingvo por universala komunikado.

Post la prelego ni iris al restoracio kie oni daŭre faris demandojn al mi pri diversaj aferoj. Kompatinda Masakato devis anstataŭ gustimi la bonajn pladojn, traduki, sed neniam ŝi montris ke la afero tedis ŝin aŭ ke ŝi iĝis laca pro la laboro kiun ŝi devis fari.



Japanaj pupoj

Vespere Masako donacis al mi viziton al teatro, kie okazas sep tradiciaj artaĵoj: teceremonio, floraranĝo, muziko, virina danco, vira danco, komedio kaj pupteatraĵo.

Tutsola mi vizitis la teatron kaj mi ne nur kun grandaj okuloj rigardis al la teatraĵo sed ankaŭ al la usonaj turistoj, kiuj kun multe da bruo okupis plejparton de la teatro kaj kiuj tre klare komprenis nenion pri tio, kion oni prezentis sur la scenejo. Dum la plej amuza teatraĵo ili ne ridis eĉ ne ridetis, sed kiam oni demandis volontulon partopreni teceremonion (oni demandis tion en la angla) ili preskaŭ batalis por esti volontulo.

Mi ne kapablis deteni ridon kiam mi vidis ke la du volontuloj tuj komencis formanĝi la kukojn kiujn oni uzas dum la ceremonio kaj kiam la virino kiu faris la teceremonion venis al la loko, la kukoj jam plene malaperis en la stomakoj de la usonanoj. Eble nur mi konstatis tion ĉar por la multaj usonanoj la afero estis plej verŝajne memevidenta. Kukoj estas por esti manĝataj, ĉu ne?

Ĝis tiam mi pensis ke mi estas la barbaro kiu vizitas Japanion. Vidante la usonajn turistojn mi sciis ke neniam mi povus superi ilian barbarecon kiam ili vizitas fremdan kulturon. La plej granda ŝoko venis en Hiroŝima, kiam mi vidis niajn usonajn turistojn kiuj pensis ke ili liberigis la japanan homaron de la diluvo, per uzado de du atombomboj. Tre klare ili ne komprenas ke atombombojn oni uzas en neniu kazo kaj certe ne kontraŭ homoj kiuj jam esti sur genuoj je la fino de la milito. Neniam mi tiel hontis esti blankulo, sed pri tio mi rakontos poste. Venontan monaton ni vizitos *Verda-n Majo-n*, mian karan kamaradinon en Kanazawa.

daŭrigota

Vorto desegnita kaj desegno skribita

"L'arto komenciĝas kie finiĝas la geometrio"
Paŭlo Standard

En 1960 Manzoni skribas en pluraj lingvoj sur ladajn skatolojn:"Merdo de artisto". Oni ne bezonas malfermi la skatolon kaj pentri aŭ fotografii la enhavon. La titolo sufiĉas por subkompreni la strangecon de la situacio kaj la ĝenon kiu invadas la spektanton. Sed bonvolu rigardi la aferon pli atente. Vi vidos ke malantaŭ la skandala verko de ĉi tiu artisto troviĝas, iel, la limo inter la lingvaĵo kaj la materio kaj denunco de la arta merkato. Sed estas la unua interpreto kiu interesos nin.



Tiel la lingvaĵo ludas rolon pli kaj pli gravan en la moderna arto. Ekzemple, Van Gogh, skribante al sia frato, enskribis la nomon de la koloroj en la diversaj partoj de la desegnoj kiujn li sendis. Duchamp atribuis koloron al iuj el siaj verkoj simple skribante la nomon. La etnologo Levi - Strauss, ankaŭ elmontris, ke la lingvaĵo permesas akrigi la percepton de la koloroj. Rimbaud trovas kolorojn por la vokaloj ... sed tio ankaŭ estas valida por la formoj, la volumoj, la aranĝoj kaj la kvalitoj de la materio. La funkcio de la lingvaĵo estas duobla: MONTRI / DENSIGI la sencon sine de tio, kion oni nomas "koncepto".

Jen, eble, okulfrapa ekzemplo :

ESPERANTO = VERDA = STELO

ESPERANTO = RUĜA = SITELO

Laŭ vi, kiu trio funkcias plej bone aŭ demandu al vi mem ĉu la koloro ruĝa ne ŝanĝus, eĉ momente, vian percepton de nia lingvo?

Tra la tuta XX-a jarcento la diversaj avangarduloj prizorgas ligon inter la lingvaĵo kaj la plastikaj verkoj (Marinetti kaj la itala "futurismo", ekzemple). La elartikigo de la eŭropa poezio estas korelativa al la detruo de la formoj (Apollinaire kaj la Kubismo). La lingvaĵo iĝas materialo.

La lingvaĵo de artistoj kiel Duchamp ne estas devige komprenebla, klara. Tamen ĝi naskas la paroladon kaj instigas la penson, la kuriozecon. Grandparto de la verko de Duchamp prezentas evidentajn aludojn al la literaturo (li estis bibliotekisto): vortludoj, ironiaj malhonestaĵoj, ŝercoj, ...

Vorto sub pentraĵo aŭ skulpturo estas unu afero sed vorto en formo de pentraĵo estas alia. Ekirante de tio, kio konstituas ĝin, la fizika korpo de la litero, la kaligrafio transformas abocon, tekston en artan verkon.




"Skribado bezonas sencon, dum kaligrafio esprimiĝas tra la formo kaj la gesto; ĝi altigas la animon kaj iluminas la sentojn", skribis granda ĉina majstro. La skribisto uzas nociojn kiel harmonio de la proporcioj, ekvilibro de la formoj kaj la ritmo de la kontrastoj. La eksprimeco kaj la spontaneco faras la kaligrafiiston. Tiel kaligrafio kaj skribo malsimilas. La litero finfine estas nur abstrakta signo al kiu oni aldonas enhavon, valoron. Sed, fronte al la kaligrafiita teksto en alfabeto aŭ fremda lingvo, bela kaligrafio ankoraŭ perfekte kortuŝas nin kiel kanzono en alia lingvo. Araba kaligrafio povas veki la estetikan plezuron.

Ne estas facila proponi difinon de ĉi tiu arto. Kulturo, civilizo, lando, imperio, kreskas ĉirkaŭ unu lingvo, kiu estas la fundamento de ilia arto kun la desegno, eble la unua estetika eksprimrimedo de la homaro. Transnacia kulturo aperos se ni uzas "verdajn" vortojn por kolori niajn verkojn.

Cirilo

Dragutin Domjanîĉ

PREĜO ĈE ŜTONPORDEGO



Altare en la nokt',
Kandeloj en trembrilo,
De l' preĝoj varma flam'
Aŭdiĝas la eldiro.

Kaj mia preĝo nun
Mallaŭte sin eklevu,
Ĉielo aŭdu min,
Kaj preĝon vi ricevu.

Okuloj, karaj vi,
Kiujn mallum' ne ĝenas,
Kaj bona via kor'
Dolorojn kiu prenas.

Okuloj, karaj vi,
Min aŭdu en obskuro,
Kaj lumon donu vi
En tristo kaj torturo.


Ho, bona koro vi,
Aŭskultu min el alto:
Pereas la anim'
En mia vivekzisto.

Se tiel estas eĉ,
Sen helpo al doloro,
Almenaŭ pacon nur,
Mi petas el tutkoro.

Tradukis: Zvonko Rehoriĉ

Stipan Blaĵetin:

MAKSIMIR



Venu al mia trankvil'
diras
Maksimir.
Venas birdoj
kaj infanoj
kaj virinoj
kaj olduloj
en oazojn miajn.
Venu al mia trankvil'
murmuras
Maksimir.
Se vin kaptas
solecsento,
doloro,
angorululo
en mi vi trovos kunulon.
Se via koro
suferas de amdoloro
en mia trankvilo
havu azilon.
Venu al mia trankvil'
muĝas Maksimir.
Pro ĉiu klopodo, peno,
aŭ dum ĝojo
vivodezira
venu al promeno.
Jen al vi trankvil'
Venu!
Vokas Maksimir.

Tradukis: Lucija Borĉiĉ



Ilica - unu el plej konataj zagrebaj stratoj

Dragutin Domjanîĉ (1875-1933)

MALNOVA ZAGREB

Mallarĝaj kaj tristaj stratoj,
Mallumaj fenestroj vi
Kaj kial al mi vi karas
En via trankvil' eĉ pli.

La domoj interpremiĝas,
Kaj pezas al ili star'.
Jam ili ripozi volus
Eĉ dormi dum tuta jar'.

Kaj ili tre multon vidis,
De peza laboro far',
Konatoj jam ĉiuj mortis
Nun fremda ĉe ni najbar'.

Preĝejon la homoj venas,
Kaj strange ekbrilis flam',
De l' preĝoj mallaŭte sonas
Ĉe l' ora altaro gam'.

La lumoj jen estingiĝis,
Kaj homoj disiris jam,
Ĉu ili pri ni nun preĝis,
Nin, kia atendas dram'!?

Tradukis: Zvonko Rehoriĉ

Stipan Blaĵetin:

ILICA

Ilica-
strato en la urbo.
Longa - longega.
Reklamoplena.
Kiel damo briloplena ĝi priridas
aliajn stratojn.
Preterpasantojn gapantajn
ĝiajn ornamaĵojn,
per vitro, tolaĵo, odoro
vestitaj.
Ilica
Estas strato.
Pasas tra ĝi homoj
post laboro.
Ilica
Strato
Damo
Zagreb-urba.

Tradukis: Lucija Borĉiĉ

Notoj:
Ŝtona pordo - unu el la kvar konservitaj pordoj de la malnova Zagrebo
Maksimir - la plej konata zagreba parko - konstruita de episkopo Maksimilian Vrhovec.

ĈU VI JAM ALIĜIS AL LA KONGRESO ? NE HEZITU !

60-A DATREVENO

La 8-an de majo 2005 okazos la 60-a datreveno de la «senkondiĉa kapitulaco" de Germanio post plurjara kruela mondvasta milito. Samtempe finiĝis neimageble terura diktatora reĝimo en Germanio kun sennombraj viktimoj - kaj multaj respondeculoj: farintoj, kulpuloj kaj krimuloj. Same poste, disfandiĝas la nombro de tiamaj viktimoj kaj kontraŭbatalantoj, kiuj kiel vidatestantoj povas persone reprezenti la historion - tre grava tasko, precipe vidalvide al junuloj por kiuj tiuj eventoj troviĝas en subjektiva malproksimeco.

La civitanoj hodiaŭ vivantaj en Germanio - escepte de malmultaj aĝuloj - ne plu persone respondecas pri la politiko, la fifaroj de la reĝimo, la 60 milionoj da mortigitoj, la holokaŭsto, la subpremo de popoloj kaj de pensoj. Tamen kiel juraj posteuloj ili hodiaŭ kaj estonte devas prilabori la historian heredaĵon. Sed kiel?

Dum la komencaj monatoj kaj jaroj kaj eĉ nuntempe, kelkaj volas kaŝi siajn siatempajn rolojn. Kiel dirite, la homoj formortas. Kelkaj el ili ankaŭ en la sekvantaj demokrataj ŝtatoj ludis publikajn rolojn. Ekzemple, nazi-juĝisto Hans Filbinger de 1960 ĝis 1966 estis ministro por internaj aferoj, kaj de 1966 ĝis 1978 ministroprezidento de la federacia lando Baden-Vurtembergo. Kurt Waldheim, kiu batalis kadre de la germana "Wehrmacht" (la vorto signifas "defendforto", ne nepras priskribi la veran rolon) sur Balkano, de 1972 ĝis 1981 estis ĝenerala sekretario de UN kaj de 1986 ĝis 1992 prezidento de Aŭstrio.

Kelkaj fuĝis eksterlanden, ĉefe al Sudamerikaj landoj, kiel ekzemple Adolf Eichmann (ajĥman), kiu organizis la "finan solvon", la ŝtate organizatan deportadon, ĝismor-tan ekspluatadon kaj fine mas-murdon de proksimume 6 milionoj da judoj el tuta Eŭropo. En Germanio, la 27-a de januaro estas la memortago por la viktimoj de la holokaŭsto, ĉar la 27-an de januaro la Ruĝa Armeo liberigis la koncentrejon Auschwitz (aŭŝvic - pole: Oswiecim). En majo 1960 la israelia sekreta servo MOSSAD eltrovis lin en Argentinio sub la kaŝnomo Ricardo Klement kaj ŝtele forkondukis lin al Israelo. La 15-an de decembro 1961 li estis kondamnita je mortpuno pro krimoj kontraŭ la juda popolo kaj pro militkrimoj. Cetere: La juĝistoj Moŝe Landau, Benjamin Halevi kaj Ichak Raveh estis germanidevenaj kaj enmigrintaj al Israelo antaŭ 1933. Dum la proceso Eichmann diris senkulpige, ke li mem mortigis neniun: "Mi nur obeis. Egale kion oni estus ordoninta al mi, mi obeintus. Mi obeis, mi obeis. Mi ne povas eliri el mia haŭto, sinjoro kapitano." (foto)


Adolf Eichmann

Alia estis "la buĉisto de Lyon", Klaus Barbie. Li torturis persone, li faris krimojn en Francio. Kaj post 1945 li daŭrigis tiel senĝene kaj malkaŝe, ke tio estiĝis lia fatalo. Li fuĝis al Sudameriko kie li transprenis nomon kaj vivdatojn de la de nazioj murdita rabeno Klaus Altmann. Li posedis etan lignofabrikon, poste vendis kinkono-ŝelon al firmao Boehringer en Germanio, komercis per armiloj, kontrabandis oron kaj devizojn al Svislando kaj Usono. Eĉ tiam li agitis kontraŭ judaj komercistoj; kaj li laboris kiel agento de la bolivia sekretservo. Barbie estis grava kontaktpersono de grupo de novnaziuloj en Eŭropo sub gvido de Stefano delle Chiaie en Italio. Tiu grupo preparis la bombatakon al la stacidomo de Bologna en 1980. Kvankam oni konis lian restadejon ekde 1971, nur la fakto ke en Francio kaj en Bolivio samtempe estis progresemaj registaroj sekvigis lian ekstradicion al Francio, kie en 1987 li pro krimoj kontraŭ homeco estis kondamnita je dumviva mallibero. Kvar jarojn poste li mortis en milithospitalo. Pluraj anoj de grupoj proksime al Barbie kaj liaj nazi-amikoj aktive enmiksiĝis en la konflikton en eksa-Jugoslavio dum la 1990-aj jaroj. Oni taksas ke pli ol 100 germanaj novnaziuloj batalis en Jugoslavio. Post fino de la milito tie multaj el tiuj solduloj iris al Sudafriko.

Malmultaj estis kondamnitaj dum la "Nurenbergaj procesoj". Francio, Britio, Usono kaj Sovetunio formis Internacian Milit-Tribunalon kaj akuzis 22 personojn. Robert Ley memmortigis antaŭ la proceso, Gustav Krupp von Bohlen und Halbach estis deklarita tro malsana (li mortis en 1950). Kontraŭ 12 de la ĉefaj krimuloj la Korto aljuĝis mortpunon: Martin Borman estis netrovebla. (Ĝisfine de la milito li restis flanke de Hitler in ties bunkro en Berlin, nur 1973 ekzamenoj konfirmis la morton de Bormann, fine pruvita per DNA-analizo en 1998. - foto) Hermann Göring sin mortigis post la verdikto. Hans Frank (ĝeneralguberniestro en Pollando), Wilhelm Frick (imperiprotektoro en Bohemio/Moravio), Alfred Jodl (ĉefo de la armea stabo kaj persona konsilisto de Hitler), Erich Kaltenbrunner (estro de la sekureca servo), Wilhelm Keitel (estro de la militista komando), Joachim von Ribbentrop (ministro por eksteraj aferoj; subtenis la planojn por ekstermo de judoj), Alfred Rosenberg (kontroladis la ideologian edukadon en NSDAP), Fritz Sauckel (respondeca pri deportado de eksterlandaj laborsklavoj), Arthur Seyß-Inquart (aliĝigis Aŭstrion al la "Imperio", poste komisaro en okupita Nederlando) kaj Julius Streicher (fondis la antisemitan demagogian fi-gazeton "Der Sürmer" - atakanto/sturmanto). Ili estis pendigitaj la 16-an de oktobro 1946. Kelkaj estis pune malliberigitaj inter 10 jaroj kaj "dumvive": Karl Dönitz (admiralo de la submarfloto kaj posteulo de Hitler kiel ŝtatestro), Walther Funk (ministro por ekonomio kaj respondeca por la militfinancoj), Rudolf Heß (kunbatalanto de Hitler kaj ties anstataŭanto en NSDAP - li sin mortigis en 1987 en brita militmalliberejo en Berlino), Konstantin Freiherr von Neurath (ministro kaj dumtempe protektoro de Bohemio/Moravio), Erich Raeder (estro de la militfloto), Baldur von Schirach (gvidanto de ĉiuj partiaj junularaj organizoj), Albert Speer (ministro por armado kaj "arkitekto" de la "totala milito").


Martin Bormann

Grandaj entreprenoj ruze silentis aŭ eĉ silentas: Ili kaj profitis de la nazia ekspluatsistemo per malmultekostaj punlaboristoj (ekz. BMW) kaj partoprenis la murdigan industrion (IG Farben - nunaj "heredantoj" estas i.a. Agfa Camerafabriko, BASF, Bayer, Hoechst, Dynamit Nobel... Eĉ en nuna tempo kelkaj rifuzas kompensopagojn al la malmultaj ankoraŭ vivantaj laborsklavoj).

Bone kompreneble sed politike netolereble, ankaŭ multaj personoj provis subpremi la memoron pri la okazintaĵoj pro individua kulpo aŭ dezirata ĝenerala amnezio (kaj amnestio). Ekzemple la jam mortinta iama federacia ministro por defendo, poste ministroprezidanto kaj estro de CSU en Bavario,

Franz Josef Strauß, iam diris: "La germana popolo havas la rajton, ne plu voli ion aŭdi pri Auschwitz." Tial dum multaj jaroj estis stranga "paŭzo". Apenaŭ okazis nepra politika disputo kaj prilaboro de tiuj historaj eventoj.

Komence, mi bone memoras el mia tempo en lernejo, homoj, precipe viroj, romantike aŭ entuziasme raportis pri iliaj dummilitaj travivaĵoj, aventuroj, memoroj pro kamaradeco,

kuraĝo - kaj pri "vojaĝoj" en foraj landoj, por multaj el ili la militaj estis la unuaj kaj solaj kaj lastaj vojaĝoj eksterlanden. Ŝerce ni ofte diris: Se oni povus kredi ilin, la Dua Mondmilito estis la plej bela ĝis nun...

Ege hontinde, ekzistas tute alia pritrakto de la historio: Ekde tiam ĝis hodiaŭ homoj primensogas, gloriumas la fiagojn de la nazia reĝimo kaj de la milito. Ili fanfarone emfazas la - certe ankaŭ malhomecajn - militajn agojn de la tiamaj kontraŭuloj. Ili adoras Adolf Hitler kaj publike festas lian naskiĝtagon. Ili pilgrimas al la tombo de Rudolf Heß (vidu supre), la "lasta viktimo" de la "malamikoj" ktp.

Okazis hontindaĵoj jenaj: Dum pluraj jardekoj la instancoj rifuzis malpermeson de la novnazia partio NPD (Nationaldemokratische Partei Deutschland) kaj aliaj. Finfine la registaro provis atingi verdikton de la konstitucia kortumo por malpermesi ĝin. Sed la kortumo devis rifuzi, ĉar multaj "pruvoj" pro la kontraŭkonstitucia sinteno de NPD-partianoj estis de t.n. V-Männer (kaŝagentoj de sekretaj servoj). Pro tia diletanteco en 2004 NPD sukcesis oficiale enpenetri en landan parlamenton de Saksio. Novnaziuloj atingis 9,2% de la voĉoj. Kaj en januaro 2005 ili provoke rifuzis partopreni silentminutojn memore al la viktimoj de la nazidiktaturo.



Detruita Dresdeno

Kontraŭe, ili parolis pri "bomba holokaŭsto de aliancitaj potencoj" kontraŭ Dresden, la saksia ĉefurbo. Fakte Dresdeno dum la 13-a/14-a de februaro 1945 spertis la kolektitan kaj kolektivan koleregon kaj furiozegon de la nacioj kontraŭbatalantaj nazian Germanion: 772 britaj kaj 311 usonaj bomb-aviadiloj ĵetis plurajn mil tunojn da bomboj. Inter 35000 kaj 70000 homoj brulmortis, inter ili multaj fuĝintoj el regionoj jam konkeritaj de la soveta armeo. Ne estis iu milita gravaĵo en Dresden, nek militindustrioj nek militvojoj. Estis ago de venĝo por Coventry kaj London - kaj certe estis provo de la aliancitaj fortoj mallongigi la tempon ĝis la fino de tiu de Hitler-Germanio fie komencita kaj jam tro longdaŭra milito. (foto)

Tre stranga kaj miopa metodo estas tia de Edmund Stoiber, ministroprezidento en Bavario. Li respondecigas la socialdemokratan-verdan registaron por la sukcesoj de la novnaziuloj. La registaro kulpu pri senlaboreco, kaj senlaboreculoj volonte sin turnu al dekstruloj. Falsa kaj stulta riproĉo: Registaro ne respondecas pri senhomeca sinteno de konzernoj kaj decidoj de profitemaj entrepren-ekonomiistoj. Kaj senlaboruloj ne aŭtomate estas naziuloj aŭ voĉdonas por dekstraj partioj.

Restas la tasko por la demokrata plimulto - ne nur en Germanio: sincere sinapogi por paco, interkompreniĝo, toleremo, justeco, frateco ktp. kaj kontraŭbatali ĉian formon de maltoleremo, ekspluatado, malpaca kverelo, rasismo.

Ofte mi jam vizitis la memorejon en iama koncentrejo Dachau (daĥaŭ) proksime al mia hejmurbo. Legeblas vorto de Santajana tie: "Kiuj ne memoras la estinton, estas kondamnitaj denove travivi ĝin."

Jomo

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris

FONDUSO NOVA PIV

Anonime 58,00 €; anonime 60,00 €; Ge-Desailly 20,00; Huberdeau 50,00; anonime (NL) 1000,00;

HELPO AL LA ASOCIO

Francio (€) Pontnau 30,00; Letzgus 3,00; Cuenot 8,00; G. Cavalier 8,00; F. Loizeau 8,00; Levesque 5,00; N. Dejean 48,00; Ge-Rapley 222,00; R. Hardy 80,00;
Nederlando (€) J.W. Moonen 23,00; S. Veen 3,00; J. van Hulst-van Maasdam 48,00; A.J.F. de Wit 100,00; A. ter Braak 48,00; S. de Korte 10,00; Zwartepoorte 8,00; K.L. de Bruin, 0,50;
Svislando (CHF) Rivière 10,00; Rooke 5,00;
Britio (GBP) A. Prent 65,00

NOVALIĜO

35721 ZHANG Jianlin, Lasengmiao Huochezhan Youju 1-hao Xianxiang, CN-016034 Wuhai-Shi, Neimenggu.
35722 HORI Yasuo, Simosinden 10-27, JP-371-0822 Maebasi, Japanio.
35723* BRLETIĆ-VIŠNJIĆ Roža, Bernarda Vukasa 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio.
35724 SIMEONE Dominique, 612 rue Gallieni, FR-78670 Villennes-sur-Seine, Francio.
35725* OKUDA Hiroko, Ookubo 3-5-5, JP-292-0815 Kisarazu, Japanio.
35726* LEFTEROVA Hristinka, kv. "Storgozija" bl. 130, vh. A, ap. 11, BG-5802 Pleven, Bulgario.
35727* KLIMIENE Egle, Taikos prospekto 77 - 61, LT-5043 Kaunas, Litovio.
35728* RAILIENE Janina, Statybininku 54 - 39, LT-5300 Panevežys, Litovio.

NEKROLOGO

Ni ĵus eksciis ke en Pijnacker (NL) mortis nia malnova membro, kamarado

G. PASMAN
(matr. 22.365)

Ni kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

***

En januaro 2005 neatendite mortis en Watford (GB) nia kamarado

Petro MILES
(matr. 35519)

Ni kondolencas al liaj familianoj kaj geamikoj.

VIAJ OPINIOJ

PRI EŬROPA KONSTITUCIA TRAKTADO

Kial jesi aŭ nei tekston kiun mi ne vidis? Ĉu mi devas konfidi iun kiu konfidus alian, kiu eble legis la tekston? Ĉar mi ne vidis ĝin en librejo kaj ne ricevis ĝin. Mi scias, oni povus trovi ĝin sur interreto sed mi havas nek monon nek sufiĉan "modernecofrenezon" por investi en tiun teknikon.
Sentante min monda civitano, mi ne konfidus al s-ro "Ĵiskar d'Esten", ĉefa redaktanto de tiu konstitucio. Riĉa kapitalisto el la nova feŭdo kiu sklavigas popolojn per "mondiĝanta ekonomio"; Li, pro persona intereso, instigas nin al nuklea energio kies rubaĵoj venenos ontajn generaciojn. Tio montras lian humanismon. Certe, mi ankaŭ ne fidas al Le Pen kiu ŝajne kaj kriante alvokas naciismajn virtojn sed silentas pri siaj mondaj posedaĵoj, havante interesojn ĝis en Ameriko (cementa industrio).
La ne vere publikigo de la teksto kaj ĝia miksiĝo kun eŭropa ekzistado ŝajnas al mi hipokrita. Tion mi ne povas jesi. Espereble la tekston popoloj resendos al verkistoj pli popolemaj, ne aprobante "mondiĝantan" sistemon kiun ni ne kontrolas, kiel Eŭropa banko kiu obeas al Monda kapitalo.

M. Marko

KIA ŜTATO ESTIS GDR?
Ĉu ĝuste Blanke scias tion?


Sinjoro Blanke ŝajne ankoraŭ nun ne havas dubon pri tio, ke la muro inter la orienta Germanio kaj okcidenta Germanio estis necesa. Por li ĝi estis certe necesa, ĉar li nur tiel kiel privilegiito rajtis veturi en la okcidentan eksterlandon. Mi kaj mia frato kaj mia fratino, kiuj estis esperantistoj kiel li, ne rajtis veturi okcidenten. Ni devis elmigri el GDR por povi ĝui la samajn privilegiojn kiel sinjoro Blanke. Li ilin ĝuis jam sen tio. Tiom pri la nebulaj multaj kaŭzoj, pri kiuj sinjoro Blanke aludas en „Viaj opinioj". Kaj se ĝuste li parolas pri tio, kio tamen funkciis en GDR kaj nun eĉ la senlaborulojn alvokas kiel atestantojn por siaj artifikaĵoj, estu dirite, ke tiaj, kiaj li detruis la socialismon, ĉar ili pensis ke la socialismo estas senkosta magazeno por la priservado de partiaj funkciuloj. La impertinenteco de GDR-funkciuloj decide kontribuis al tio, ke la socialismo en la tielnomata „ŝtato de la laboristoj kaj kamparanoj" en GDR disrompiĝis. Tute evidente pinĉas lin ankaŭ nun neniuj duboj pri sia rolo en GDR, kiel pruvas tion pli ol sufiĉe liaj laŭdokantoj, kiujn li ankoraŭ nun kantas en siaj publikaĵoj, se temas pri sia persono en GDR. (Legu ankaŭ en Sennaciulo pri tio.) Interesa fakto estas tiu, ke sinjoro Blanke tiam pro sia posteno estis granda komunisto. Li eĉ tradukis tiam „La Komunista Manifesto"-n. Por povi kapti privilegiojn necesis esti membro de la partio SED. Kaj aldone necesis esti doktoro aŭ profesoro. Sed nun sinjoro Blanke ne plu estas komunisto, ne plu aktiva ĉe komunistoj en la E-movado, ĉar nun ne plu kapteblas privilegioj per tio. Nun oni ankaŭ ne plu povas gajni honorojn per tio, ke oni kiel ĉefo de la E-movado en GDR helpis elspioni aliajn esperantistojn, kiel oni ekzemple elspionis min en Lepsiko. Oni ne plu povas glori la muron, oni ne plu povas elsendi leterojn, ke la sendado de manuskskriptoj al la okcidenta eksterlando estas malpermesita, kiel Blanke tion faris, ĉar la muro dank' al la iniciato de multaj GDR-anoj (ankaŭ de mi) kaj historiaj hazardoj falis, ktp... Min en Lepsiko elspionadis familio S., tion mi scias de sinjoro M. B., kiu estis tiam redaktoro de la regiona E-gazeto „Saksa kuriero". Familio S. estis la gvidantoj de la E-movado en Lepsiko, konataj ankaŭ kiel redaktoroj. Mi supozas, ke Blanke nun asertas, ke li ne sciis ion pri tio. Sed kiu kredu tion? Eble lia avino. Jes, li rakontu tion prefere al ŝi. Tiu eble kredas tion al li, ĉar sinjoro Blanke tiam estis la ĉefo de la E-movado en GDR. Mi ĉiam denove miras, kiel tia kia li, nun volas rakonti al ni kiel GDR estis en vero. Tio estas impertinenta kaj senhonta. Je lia loko mi pro honto sinkus en la teron. Kaj tial mi tre miras, ke ĝuste li nun sidas kun edzino en komitato de Belartaj konkursoj ĉe UEA kaj kontrolas denove kion aliaj faras. Mi tial ne povas partopreni en tiu konkurso. Mi ne lasas denove kontroli min de ili.

Kara Vilhelmo, kvankam vi ne vivis en GDR, mi diras al vi kiel iama elmigrinto el GDR, kiu devis atendi kvar jarojn ĝis ellaso el GDR, ne sen antaŭe esti elĵetita el sia laboro en kulturdomo aŭ kiel asekuristo ktp...ke vi tute pravas, tian socialismon kun tiaj gvidantoj, kiuj senhonte ĝuas privilegiojn, ni ne denove bezonas. La komunismo de tiaj gvidantoj kondukis al katastrofo kun milionoj da murdigitoj en la koncentrejoj de Stalin aŭ Mao aŭ en la Rumanio de Ceausescu. Tia socialismo detruis la socialismon ankaŭ kiel ideon por longa tempo. Jen grava kaŭzo, kial senlaboruloj, kiuj estu atestantoj por Blanke, ankoraŭ nun dubas pri la pravigiteco de la ideo de la socialismo. En GDR la socialismo pro diversaj kialoj estis ne tiom terura, ne tiom brutala, sed ankaŭ en GDR oni pafmortigis homojn sen iu proceso en Lepsiko. En la ekzamena prizono Kästner-strato, oni torturis „ŝtatmalamikojn" en specialaj ĉeloj en Bautzen. Ankaŭ en GDR oni strangolis ĉiun liberan vorton. Blanke helpis ĉe tio. Ĉiuj, kiuj spite al ĉiuj tiuj spertoj tamen ankoraŭ nun gloras tiun sistemon de la subigo de la laborista klaso kaj de murdigo de multaj milionoj da homoj estas aŭ senhontaj aŭ stultaj. Sinjoro Blanke elserĉu, kio el tio en lia kazo estas la ĝusta. Mi estas pro tiaj spertoj por tio, ke la liberigo de la laboristoj povas esti nur la afero de la laboristoj mem. Ĝuste tiel, kiel tio legeblas en la Komunista Manifesto tradukita de la iama komunisto Blanke. La privilegiitoj laŭ Blanke tion neniam faros por la laboristoj, ĉar ili denove plenigos nur la proprajn poŝojn, kiel kutime. Unue mi, poste nenio kaj tiam iam ĉe la fino eble ankoraŭ la aliaj, se ankoraŭ io restis, post kiam ni mem jam sufiĉe plenŝtopis nin per ĉiuj eblaj atingeblaj privilegioj, jen ilia pensmaniero. Tiel pensis la funkciuloj en GDR, precipe tiuj, kiuj ne hontis veturi kiel „vojaĝkadroj" en la okcidenton. Ili preskaŭ ĉiuj estis anoj de Stasi. Jes ja! Ili pensis kutime, ke ĉiuj aliaj estas ŝtipkapuloj, ĉar nur ili scias, kio estas la vero kaj kio ne, tiel kiel sinjorino Blanke, tute evidente ankoraŭ nun pensas tion, se li donas la rolon de GDR-eksperto. Sed estu foje de mi dirate al la legantoj de Sennaciulo, ke sinjoro Blanke vivis en alia GDR ol la plej multaj GDR-anoj, por kiuj GDR estis nenio alia ol granda prizono kun manpleno da diktatoroj en la pinto de la ŝtato, al kiuj Blanke servis obeeme kaj kun ŝvelinta brusto. Sed ne ĉiuj esperantistoj en GDR agis tiel, estis ankaŭ aliaj, ekzemple mia frato, mia fratino kaj mi! Ni ne provis vivi kiel piedlekantoj de partiaj princoj, sed elmigris el la ŝtato, kiu degeneris al paradizo por privilegiita partiokasto.

Cezar!



78-A SAT-KONGRESO ZAGREB (HR) 02.- 09.07.2005



Korespondadreso:
Marija Belošević, 78a SAT-kongreso, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.
Tel.: +385.98.57.00.46, rete: sat_hr@yahoo.com, hejmpaĝo: http://www.78sat-kongreso.tk

OKK: Marija Belošević, Gordana Plavšić, Zdenka Svetličić.

Kongreskotizoj (en €)	**ĝis 30.04.05**	**ĝis 30.06.05**	**pli poste**
SAT-membro	65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)	95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25 j.	30	35	40
Nemembro de SAT	80	90	100
Junula nemembro de SAT	40	45	50

❑ Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
❑ La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU (krom EE, LT kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.
❑ La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro ia ajn ekstera kaŭzo.
❑ Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.
❑ La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj aliajn pagendajn aferojn. Ĝi ne inkluzivas ian ajn asekuron.
❑ ATENTU : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Kroatio, devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2005. Pli poste ne plu eblos trakti tion. Ni petas ke vizpetantoj nepre aldonu necesajn datumojn.
❑ Al nealiĝintoj la OKK ne sendas invitleteron.
❑ Aliĝo al la kongreso validas nur post la pago de la kotizo kaj koncernaj prezoj.

OKK komunikas

Loĝado:
En la kongresejo dulitaj ĉambroj en la plej alta kategorio (t.e. propraj banĉambro kaj necesejo) ne plu mendeblas. Tiuj kiuj deziras pli luksan loĝadon povas elekti inter du hotelaj proponoj. En la kongreseja areo daŭre mendeblas unulitaj ĉambroj (kun propra banĉambro kaj necesejo) kaj dulitaj ĉambroj (kun komunaj banĉambro kaj necesejo), sed ankaŭ tiuj supozeble baldaŭ elĉerpiĝos.

Ankaŭ estas petataj kongresanoj kiuj aliĝis sed ankoraŭ ne mendis loĝadon ke ili tion faru kiel eble plej rapide.

Grave: deziratajn mendojn oni povas trakti nur post ilia pago. Ni ne povas rezervi deziratan loĝkategorion por ke vi pagu surloke.

Postkongreso:
Ĝi povas realiĝi nur se aliĝos **minimume 35 partoprenantoj**. La informon pri ĝia okazo aŭ nuligo ni komunikos al la aliĝintoj fine de majo ĝis kiam ni petas tiujn kiuj intencas partopreni postkongreson aliĝi.

Premiitoj de la konkurso:
Inter la ricevitaj respondoj ni premias per la libroj: Willy Ehlers, Germanio kaj Vilĉjo Simcock, Britio.
Memoraĵojn ricevos: Zlatka Stoilova, Bulgario kaj Franciska Toubale, Aŭstralio.

Nur unu konkursanto listigis ĉiujn landojn kun kiuj limas Kroatio, t.e. Slovenio, Hungario, Serbio kaj Montenegro, Bosnio kaj Hercegovino kaj Italio. Kun ĉi lasta limo estas mara, sed la demando ne eksplicite petis listigon de «terlimoj». Gratulon al premiitoj!

Alvoko al la kongresanoj, sed ankaŭ al ĉiuj SAT-anoj kaj amikoj de Zagreb kaj Kroatio:
Ĉu vi jam estis en Zagreb kaj/aŭ en iu(j) alia(j) parto(j) de Kroatio? Se jes, sendu viajn fotojn al la adreso de la OKK. Vi povas sendi ĝin ankaŭ
rete al <sat_hr@yahoo.com>.
Dum la kongresa semajno ni okazigos publikan ekspozicion «Zagreb kaj Kroatio antaŭ mia fotilo».
Plej interesajn fotojn ni volonte uzos por ilustrado de la kongresaj publikaĵoj inkluzive la ttt-paĝon. Pro tio ni anticipe dankas, je via preteco doni al ni rajton je tio.

Samtempe ni bonvenigas viajn impresojn pri Zagreb kaj Kroatio: ĉu proze ĉu poezie.

Fotoj kaj skribaj impresoj estas bonvenaj al la adreso de la OKK ĝis la 10a de junio, ĉi-jare.

Kongresa glumarko:
Kongresa glumarko aĉetebla ĉe la sidejo de SAT.

La aktualajn informojn pri la kongreso vi ĉiam povas trovi ĉe la ttt-paĝo: www.78sat-kongreso.tk

Adreso de la OKK:
OKK de la 78a SAT Kongreso
Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb,
Kroatio,
sat_hr@yahoo.com,
www.78sat-kongreso.tk

Ĉu vi sciis pri la kongresurbo ke....?

PRI ZAGREBO



En la skribaj dokumentoj oni la unuan fojon renkontas Zagrebon en la jaro 1094 kiam estis fondita diocezo. Per la ĉarto de la hungara reĝo Bela la 4a en la jaro 1242 Zagreb (Gradec) iĝis libera reĝa urbo. En la jaro 1577 oni la unuan fojon mencias Zagrebon kiel ĉefurbon de Kroatio. En la jaro 1850 ĉiuj partoj de la urbo estis unuigitaj kaj tiel ĝi iĝis unueca urbo.


Blazono de Zagrebo kun la malfermitaj pordoj simbolas malfermitecon de la urbo al ĉiuj bonvolaj homoj. Sed ne ĉiam la pordoj de la urbo estis malfermitaj. La 5an de novembro 1647 la pordoj estis fermitaj pro la timo de pesto. Ĉiuj pordoj krom la ŝtona pordego estis fermitaj kaj tiujn oni atente kontrolis.



Placo Sta. Marko kun simbola preĝejo

Foto: Marija Belošević

Placo de Sta Marko dum la historio rolis centran lokon. La preĝejo estis fondita en la 13a jc. De la 15a jc. tie okazis regulaj semajnfinaj foiroj. Poste tie estis lokita konstruaĵo de la ŝtata parlamento (la konstruaĵo estis konstruita inter la jaroj 1908 kaj 1910) kaj konstruaĵo de la kroata registaro.



Dora - ĉefa personeco de romano "La trezoro de l'oraĵisto"

Foto: Marija Belošević

Pluraj verkistoj en siaj verkoj priskribis Zagrebon. Unu inter plej rimarkindaj verkoj certe estas «La trezoro de l' oraĵisto» de August Ŝenoa (1838-1881). Temas pri la historia romano el la 16a jc. La romano estas la unua kompleta granda verko tradukita el la kroata al Esperanto. Ĝia traduko aperis en la jaro 1911 far Fran Kolar-Krom. Antaŭ Esperanto, ĝi estis tradukita al la slovena, pola, bohema kaj germana lingvoj. En la romano oni renkontas belan filinon de la oraĵisto Dora, kies skulptaĵo troviĝas apud la Ŝtona pordego. Tiu pordego restas nura konservata inter kvar pordegoj kiujn havis Gradec. La mencion de la pordo oni la unuan fojon trovas jam en la jaro 1362. Dum la 14a jc. tie troviĝis eta kapeleto.

En la jaro 1891 en Zagrebo aperis la unua tramo tirata de ĉevaloj. Elektra tramo aperis en la jaro 1905. La tramreto estis signife plivastigita en la jaro 1979 kiam oni inaŭguris la linion trans rivero Sava. En la jaro 1954 aperis la unua numero de la informa gazeto de Zagreba Elektra Tramo (ZET) redaktita de Zvonko Rehoriĉ, fervora esperantisto (i.a. tradukis plurajn poemojn de kroataj verkistoj). De la unuaj numeroj de la gazeto ĝis fino de la jaro 2003 en la gazeto ekzistis rubriko «Tra la mondo» al kiu kontribuis Esperantistoj per urbtrafikaj novaĵoj.

Survoje de la ĉefa placo al la stacidomo troviĝas arta paviliono. Paviliono post servado al budapeŝtanoj festi miljaran jubileon de hungara invado en Panonion en la jaro 1896, du jarojn poste estis donacita al Zagrebo.



Arta paviliono

Foto: M.B.

Hodiaŭ ĝi servas kiel ekspoziciejo.

Vidalvide al la paviliono, ĉe la adreso de Placo de reĝo Tomislav 21, troviĝas unu inter malmultaj ZEOj en Zagrebo. En tiu domo en la jaro 1909 estis la redakcio de «Kroata Esperantisto», unua E-gazeto en Kroatio kies unua numero aperis la 10an de aprilo 1909. Memorante datrevenon, tie Zagreba Esperanto-Ligo starigis la memortabulon.



Memortabulo starigita de Zagreba Esperanto-Ligo en la jaro 1989

Foto: M.B.

Okcidenta parto de la urbo Dubrava, kie i.a. okazos nia kongreso, kiel urboparto iĝis nur en la jaro 1949. Antaŭ tiu jaro estis devige skribi «Dubrava apud Zagreb».

Dum la mezepoko ĝi estis eklezia bieno kiun uzis vilaĝanoj el ĉirkaŭaj vilaĝoj. Ĝia nomo devenas de la arbaro. Formon de la loĝloko ĝi ricevis fine de la 19a kaj komence de la 20a jc.